

特別

14

2090

58 (16)

Sinjoro Hasegawa Tacunoske  
Ni 34, 10, Nisi-katamaei  
Hongok, Tokio.

Estimata Samideano!

Kelkaj japanaj samideanoj jam  
sendis al mi poŝtkartojn kun peto pri  
interkorespondado. Mi ĉiam respondis  
jese, kaj tamen mi neniam vidis daŭ-  
rigon. Ĉar mi multe deziras havi  
komunikadon kun esperantisto en via  
lando, mi do permesas min deman-  
di, ĉu vi kompleze konsentas doni



al mi kelkajn priskribojn pri via lando, kaj pri ĝiaj literaturo kaj arto. Se vi mem ne volas akcepti tiun ĉi proponon, mi respektive petas, ke vi donu tiun ĉi leteron al alia esperantisto, pri kiu vi povas supozii, ke li volas respondi. Rekompence mi donos kinja ajn deziritajn informojn pri mia nacio, aŭ pri la vastiĝo de Esperanto en Eŭropo.

Mi estas fervoja oficiisto loĝanta en malgranda provinurbo, kaj mi kunmetas bildon de tiu. La urbo mem tamen estas malpli rimarkinda ol la ĉirkaŭa pejzaĝo, kiu estas tre

bela kun multe da lagoj kaj montetoj. Tre proksime, je interspaco de nur 10 kilometroj, estas la suda fino de arbarego, kie ursoj ankoraŭ estas troveblaj.

En la lastepasinta vintro mi faris kelktagan vojaĝon en Belgio kaj Holando, kaj tie mi renkontis multajn esperantistojn. Dum ses tagoj mi tiam parolis Esperanton, kaj post la unua horo tio estis tre facile. Cetere mi lernis mian lingvon en 1903<sup>a</sup>, sed-ĉar mi loĝas tiel izole-mi ĝenerale povas uzi Esperanton nur por skribado.



Se vi desiros legi rakontojn el la sveda literaturo, mi tre volonte sendos al vi manuskripton kun tradukaĵoj, kiujn mi faris el famaj verkoj. Mi scias, ke ~~libra~~ rakonto de sveda verkistino (Selma Lagerlöf) estas tradukita eĉ en vian nacian lingvon, sed nun mi ne povas trovi la nomon de tia japana gazeto, kiu presis tiun rakonton.

Sincere via

John Lundgren.

Adreso: Hedemora, Sverige,  
(Svedlando)  
= Sweden.

La 6<sup>an</sup> de decembro 1907.



Hedemora från Kyrktornet. Kyrkogatan.



100  
1008  
1008



B R E V K O R T

Correspondenzkarte

Carte Postale

Levelező-Lap

Dopisnica

Weltpostverein

Cartolina postale

Karta korespondencyjna

**Postkarte**

Union postale universelle

Briefkaart

Dopisnica

Post card



Vertical line on the left and horizontal lines for writing address and message.



14 特  
2090  
58 (16)





Sinjoro Hasegawa Tacunoske

Ni 34, 10, Nisi-katamaei

Hongok

Tokio

Japan.



Handwritten text in Cyrillic script: *Нольдену 8<sup>го</sup> Инбару*

特別  
14  
2090  
58 (16)封

Afsändare:  
*John Lundgren  
Hedemora*



Handwritten text in blue ink, possibly a signature or address: *John Lundgren*